



NORDHUNGARIA INFORMO

**Informilo de „Király Lajos” Esperanto - Amika Rondo
Miskolc**

Februaro 2008.

FEBRUARO	3
DE URBO KANIZSA AL ISLANDO	3
SZABADI Tibor J. (Sabadi Tibor J.)	4
Mi rigardadas vin	5
(Elnézlek)	5
UEA – nia monda organizaĵo	7
-daŭrigo-	7
- Parto II-a -	7
FEINDANCO DE AVINJO	9
ŜARKIDNASKIĜO PERE DE PARTENOGENEZO	9
NI RIDU	10
LA FESTO DE PUNTO en BÁBOLNA, la 25-26-an de Aŭgusto en 2007	11
I-a parto	11
REAPEROS LA ZAMENHOF-MUZEJO KAJ ESPERANTO CENTRO	13
VINTRAJ FAREDAĴOJ – MANĜAĴOJ	14
KOREKTO	15
DATREVENOJ	17
LA BONA IDEO	17
POPOLAJ OBSERVADOJ, ONIKREDOJ	17
MI REMEMORAS PRI ADA CSISZÁR	18
NI FUNEBRAS DENOVE	20
La JARO 2008-a	22

FEBRUARO

Februaro, Februaro!

Se temas pri Februaro, ĉi tie en Miskolc, jam meze de Januaro la urba publikemo brulas pro la antaŭpreparoj de la februara „Galantinofestivalo”,

La tiama gastigado estos destinata malpliigi la, malprofiton de la vintra sezona gastoforresto. Krome, ĝi donos eĉ bonajn amuziĝeblecojn kaj al la junuloj, kaj al la plenkreskuloj. Ĉiujare okazas ia eksterordinara evento, spektaklo, pro tio ĉiu ekscitite atendas; kion prezentos nun la diversaj artistoj?

La 2008-a jaro estas jaro ne nur, de la LINGVOJ kaj de la TERO, sed ankaŭ de la RANOJ kaj pro la simbolo de urbo Miskolc, kiu estas la rano sidanta sur galantinplena telero,, tial la antaŭprepariga febro pli granda estas, ol kutime.

En unu el la mezlernejoj de Miskolc, komenciĝis „Rano-konkurso”, titolita: „Kiu scias pli multe pri la ranoj?” Dum la Galantino festivalo okazos la premiotransdonoj al la gajnintoj de la konkurso.

Pri la aktualaj novaĵoj de la Miŝkolca Bestĝardeno, sinjoro direktoro – Pilcz Olivér – antaŭ ĉio mencias la unikan tn: „Rano-realaĵprogramon”, kio videbla estos sur la reto ĝis la fino de Februaro, ligiĝante al la „Galantinofestivalo”. La interesantoj povos priatenti rete, la ĉiutagojn de la afrikodevena „Bovorano” en la bestejo. En ĉi tiu programo la kreantoj de la reta paĝo, ŝatus alvoki la atenton ankaŭ al la danĝerigaj aferoj pri la vivo de la bestoj.

Laŭ sinjoro direktoro: ekde la dinosaŭroj nek unu bestospecio estis tiel danĝerigata, kiel nun la amfibioj, ĉar el la 6000 bestospecioj 2000 estas proksime al la formortiĝo.

La direktoro krome rakontis, ke la bestaro de la (laŭ la malnova nomo) Miskolca Sovaĝbestejo – plimultiĝis per kelkaj novaj bestospecioj.

(Laŭ la sinjoro direktoro ekde la dinosaŭroj nek unu bestospecio estis tiel grandmezure danĝerigata, kiel nun la amfibioj, kaj el la 6000 besto specioj 2000 estas proksime al la formortiĝo.)

La sinjoro direktoro rakontis plue, ke la bestoj bone eltenas la vintron, eĉ la Aŭstralio devena EMUO (kuranta birdo simila al la struto) kaj ankaŭ la TIGROJ.

(La supran tekston baziĝantan parte al la semajngazeto MINAP (05.01.2008.-a) esperantigis: Adrienne, sinjorino Pásztor, reviziis Attila Makay el Oradea)

DE URBO KANIZSA AL ISLANDO

Kiel invitita gasto de la Landa Kongreso de islandaj esperantistoj: Szabadi Tibor (Sinjoro Tibor Sabadi), esperantista artatradukisto, prelegis en urbo Hale, kiu situas en Suidorienta Islando, 1350 kilometrojn for de Rejkjavik. La Agadon de la esperantisto de Kanizsa (Kaniĵa) konante kaj rekonante Kristján Eiríksson petis lin, - prezidanto de Islanda Esperanto Asocio-prelegi pri la tradukscienco pere de Esperanto, en rilato de la literatura traduko.

Dum la tie pasigita unu semajno, en kompano de liaj gastigantoj li konatiĝis kun la belecoj, famaĵoj de la islanda pejzaĝo kaj kun la vivmaniero de la islandanoj.

Vilborg Dagbjartsdóttir, la fama islanda poetino fiere dankis, ke li hungarigis ŝian poemon titolitan „Sekreto”.

Sur la retpaĝo www.magyarero.hu estas troveblaj la verkoj de sinjoro Tibor Szabadi, kaj inter ili ankaŭ la poemtraduko „Titok” (Sekreto).

SZABADI Tibor J. (Sabadi Tibor J.)




Foto pri Tibor Szabadi

Li naskiĝis en 1952. (en hungara urbo Nagykanizsa /nadjkaniĵa/), li estas esperantisto, verkotradukinto, redaktoro, filozofo, ano de: Hungara Verko Asocio, EPC (Esperanto PEN Centro), Hungara Semiotika Asocio, AIS (La Akademio Internacia de la Sciencoj San Marino) kiel akademia adjunkto pri filozofio, ano de la Scienca Esploristoj de Societo en urbo Nagykanizsa, kaj ano en aliaj organizoj. Ĝis nun pli ol 65 traduklibroj, redaktitaj libroj, revuoj, diversaj eldonaĵoj aperis kun lia helpo aŭ el lia plumo, kaj li estas verkanto de sennombraj publikaĵoj en la hungara kaj en Esperanto. Inter alie li redaktis kaj tradukis la UNUA EŬSKA-HUNGARA bazvortaron kune kun la eŭska verkisto, filologo S-ro Aitor ARANA.

En la hungaraj verkotradukoj de SZABADI Tibor J estas:

Divaldo Pereira Franco: „Boldog élet” (Vivo feliĉa)

Divaldo Pereira Franco: „A Magvető” (La Semisto)

Y. A. Pereira: „Egy öngyilkos emlékei” (Memoraĵoj de Sinmortiginto), kiun volumon oni eldonis en Brazilio, k tiu libro rolas inter la 10 plej bonaj verkoj de Spiritisma Literaturo en la XX. jarcento.

Allan Kardec: „A Szellemek könyve” (La Libro de Spiritoj)

Esperanton li lernis en 1966.

J. Tibor Szabadi



La izlanda poetino kaj Tibor Szabadi

Irén Soltész

**Mi rigardadas vin
(Elnézlek)**

Mi rigardadas vin, kiel lace vi sidas,
mi sentas, ne de mi vi fuĝas,
ĝuste vi dormetas,

sur nud-plandoj mi ŝteliĝas,
ege feliĉa mi estas,
silente mi ridetas,

memorante ĉirkaŭplektadon de viaj brakoj,
plezurdancon de l' streĉiĝataj nervoj,
trankviliĝon de niaj batantaj koroj,

sur nud-palndoj mi ŝteliĝas,
la simplaj ĉiutagoj belaj estas,
apud vi hejme mi estas,

ĉirkaŭbrakas min la ĉarmo de sekureco,
mi povas trakuri de l' songkampo,
novajn miraklojn vidas mia animo.

El la hungara tradukis: Szabadi Tibor J.



La bildoj montras samideanon Tibor Szabadi, en Islando.
La fotojn sendis: Kristján Eiríksson, prezidanto de Islanda Esperanto Asocio

Osmo Buller

**UEA – nia monda organizaĵo
-daŭrigo-
- Parto II-a -**

UEA konsistas el individuaj membroj kaj el aliĝintaj landaj kaj fakaj asocioj. En la jaro 2005 estis 6111 individuaj membroj en 113 landoj. Nuntempe 67 landaj asocioj estas aliĝintaj al UEA. La Hungara Esperanto Asocio (HEA) estis akceptita en la UEA-familio en 1962. Ankaŭ grandaj fakaj asocioj povas aliĝi al UEA. Nun 7 fakaj asocioj estas aliĝintaj: blinduloj (LIBE), fervojistoj (IFEF), filatelistoj (ELF-AREK), instruistoj (ILEI), komercistoj (IKEF), medicinistoj (UMEA) kaj sciencistoj (ISAE). Fakaj asocioj, kiuj estas tre malgrandaj aŭ kiuj ne estas neŭtralaj rilate politikon aŭ religion, ne povas aliĝi al UEA, sed ili povas fari kontrakton pri kunlaboro kun UEA. Nun estas 34 tiaj asocioj. Informoj pri la landaj kaj fakaj asocioj troviĝas en la Jarlibro.

La aliĝintaj asocioj partoprenas en la gvidado de UEA pere de la Komitato, kiu estas la supera organo de UEA. Se ili havas pli ol 100 membrojn, ili rajtas elekti po unu membron al la Komitato. Tiujn membrojn oni nomas “komitatanoj A”. Nun en 2008, hungara komitatano “A” estas nurnure unu: sinjoro József Baksa. D-ro Imre Ferenczy kaj István Gulyás estas komitatanoj, sed ili reprezentas UMEA-n, resp. IFEF-on. Nuntempe hungaraj “B” kaj „C” komitatanoj ne estas en la Komitato de UEA. Asocioj, kiuj havas malpli ol 100 membrojn, elektas observanton, kiu ne havas voĉdonrajton en la Komitato. Individuaj membroj estas reprezentataj de “komitatanoj B”. Por ĉiu milo da individuaj membroj estas unu komitatano B. La individuaj membroj elektas ilin per poŝta voĉdonado. La komitatanoj A kaj B rajtas kompletigi la Komitaton ankaŭ per aparte kompetentaj movadanoj. Ili fariĝas “komitatanoj C” kaj ilia nombro rajtas esti maksimume kvarono de la nombro de komitatanoj A kaj B. La nuna Komitato estis elektita en 2007. En ĝi estas 60 komitatanoj A, 6 B, 10 C kaj 10 observantoj. La oficperiodo de la Komitato estas tri jaroj.

La Komitato kunsidas dum Universalaj Kongresoj. Tiam ĝi aprobas la agadraporton de la Estraro, financajn raportojn kaj buĝeton por nova jaro. Ĝi faras ankaŭ multajn aliajn decidojn, ekzemple distingas meritplenajn movadanojn per honora membreco de UEA. Nun vivas 66 honoraj membroj. Inter ili estas la eminentaj hungaroj: dr. I. Ferenczy, dr. E. Dudich, dr. O. Haszpra, dr. F. Jáki.

Ĉiun trian jaron la Komitato elektas Estraron de UEA. La ĉefa tasko de la Estraro estas plenumi la agadplanojn de la Komitato. La Estraro havas kutime 6 ĝis 8 membrojn. La plej grava membro estas la Prezidanto de UEA. Inter 2001 – 2007 D-ro Renato Corsetti el Italio estis la Prezidanto. Ekde la 2007-a UK s-ro profesoro Probal Daŝgupta estas la Prezidanto de UEA el Hindujo. /La unua koreo, kiu atingis tiun plej altan postenon de la Esperanto-movado, estas Prof. D-ro Lee Chong-Yeong, kiu estis Prezidanto 1995-1998. Li estis populara kaj aktiva prezidanto. Li energie klopodis por antaŭenigi Esperanton kiel rimedon de lingva demokratio en internaciaj rilatoj. Li iniciatis Nitobe-simpozion, kiu okazis unuafoje en la UK en Prago en 1996 kun reprezentantoj de Unesko kaj aliaj internaciaj organizaĵoj, kiuj diskutis pri la lingva problemo en internaciaj rilatoj. (La simpozio estis nomita laŭ D-ro Nitobe Inaze, iama asista ĝenerala sekretario de Ligo de Nacioj. Li ĉeestis kiel observanto la UK en Prago en 1921 kaj faris favoran raporton pri la funkciado de Esperanto.) Prezidanto Lee iniciatis ankaŭ la Manifeston de Prago, kiu koncize kaj klare prezentas la celojn de la nuntempa Esperanto-movado. Miloj da esperantistoj subskribis la Manifeston./

Apud la Komitato kaj Estraro laboras multaj komisionoj por specialaj kampoj. Ege konata estas Komisiono pri la Azia Esperanto-Movado (KAEM), kiu plifortigas la kunlaboron inter aziaj Esperanto-organizaĵoj kaj klopodas disvastigi Esperanton en landoj, kie Esperanto estas malforta. Ĉiun duan jaron KAEM organizas Azian Esperanto-Kongreson, kiu laste okazis en Katmanduo, Nepalo, en 2005. En 2008 ĝi okazos en Bangaloro, Barato.

Supre mi jam menciis la Centran Oficejon (CO). Nuntempe ok oficistoj laboras tie. Ilia estro estas la Ĝenerala Direktoro. Ofte ili ricevas helpon de volontuloj, kiuj venas al la CO por mallonga periodo. La CO plenumas plej diversajn administrajn kaj praktikajn taskojn. Tie oni administras la kotizojn, adresojn kaj aliajn informojn de la membroj kaj zorgas pri la financa librotenado. La CO administras ankaŭ t.n. UEA-kontojn. Ĉiu membro rajtas havi konton ĉe UEA, kiu faciligas pagojn al aliaj membroj, asocioj, libroservoj, gazetoj ktp. En la CO funkcias ankaŭ granda libroservo, kiu vendas librojn, diskojn kaj aliaj varojn al esperantistoj en la tuta mondo. Nuntempe estas pli facile esti kliento de la libroservo, ĉar ĝia katalogo troviĝas en Interreto, katalogo.uea.org, kaj oni povas mendi ĉion rete. UEA ankaŭ mem eldonas librojn. Kutime ili estas verkitaj de aŭtoroj ekster la CO, sed la CO preparas ilin por presado. Eble la plej fama Esperanto-libro estas la Jarlibro de UEA. Ĝi estas redaktata en la CO kaj ĉiuj individuaj membroj ricevas ĝin. La redaktoro de la monata revuo Esperanto vivas kaj laboras ekster la CO, en Slovakio, sed pluraj tekstoj en ĉiu numero estas verkitaj de oficistoj de la CO, kiuj ankaŭ provlegas la revuon antaŭ presado.

En la CO laboras ankaŭ Konstanta Kongresa Sekretario (KKS). Li estas la ĉefa organizanto de Universalaj Kongresoj, kiuj okazas ĉiujare en malsamaj landoj. La unua UK okazis en 1905 en la franca urbo Bulonjo-ĉe-Mar. En 1994 UK okazis en Seulo kun 1776 aliĝintoj. En 2006 ĝi estis en Florenco, Italio, kaj en 2007 ĝi okazis en Jokohamo, Japanio. En 2008 la UK okazos en Roterdamo por festi la 100-jariĝon de UEA. Organizado de UK estas enorma laboro, kiun KKS ne povas fari sola. Liaj ĉefaj helpantoj estas la estraranoj de UEA, oficistoj de la CO kaj la membroj de Loka Kongresa Komitato (LKK). Ĉiu UK havas propran LKK, kiu konsistas el esperantistoj de la kongresa lando. Dum la kongresa semajno laboras ankaŭ pluraj dekoj da helpantoj.

La CO ne estas la sola oficejo de UEA. Ekde 2001 funkcias Afrika Oficejo, kiu unue troviĝis en Togolando kaj ekde januaro 2006 en la urbo Lokossa en Benino. Tie laboras du oficistoj, kies ĉefa tasko estas prizorgi instruadon kaj informadon pri Esperanto en afrikaj landoj. Multe pli malnova estas Novjorka Oficejo, kiu jam 30 jarojn zorgas pri reprezentado de UEA ĉe Unuiĝintaj Nacioj. Tie ne estas salajrataj oficistoj, sed la laboro estas farata de volontuloj. En la aliaj urboj, kie UN havas oficejon (Ĝenevo kaj Vieno), UEA ne havas oficejon sed en ambaŭ urboj tri esperantistoj reprezentas UEA ĉe diversaj kunsidoj. En Parizo reprezentantoj de UEA prizorgas la rilatojn kun Unesko.

En la sino de UEA funkcias aparta organizaĵo por junularo. Ĝi estas Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (TEJO). Ĉiu membro de UEA, kiu estas malpli ol 30-jara, estas aŭtomate membro de TEJO kaj ricevas ĝian riĉe ilustritan revuon Kontakto, kiu enhavas ankaŭ facilajn tekstojn por komencantoj, kaj la novaĵbultenon TEJO tutmonde. La plej fama servo de TEJO nomiĝas Pasporta Servo, kiu provizas senpagan loĝigon por vojaĝantaj esperantistoj. Ĉiujare aperas libreto kun adresoj de gastigantoj. La plej lasta eldono enhavas adresojn de 1320 gastigantoj en 92 landoj. Detalaj informoj pri TEJO troviĝas en ĝia retejo www.tejo.org kaj pri Pasporta Servo en www.tejo.org/ps.

La supra priskribo ne estas kompleta prezento de la tuta strukturo kaj agado de UEA. Se vi volas legi pli vaste, bv. konatiĝi kun la retejo de UEA, www.uea.org. Fine mi devas menciigi la celojn, kiujn UEA klopodas antaŭenigi per sia agado. Ili estas menciitaj en la Statuto de UEA, kies nuna versio estis akceptita en 1980:

- a) disvastigi la uzadon de la internacia lingvo Esperanto;
- b) agadi por la solvo de la lingva problemo en internaciaj rilatoj kaj faciligi la internacian komunikadon;
- c) plifaciligi la ĉiuspecajn spiritajn kaj materiajn rilatojn inter la homoj, malgraŭ diferencoj de nacieco, raso, sekso, religio, politiko aŭ lingvo;
- ĉ) kreskigi inter siaj membroj fortikan senton de solidareco, kaj disvolvi ĉe ili la komprenon kaj estimon por aliaj popoloj.

Ĉu ankaŭ vi subtenas tiujn celojn? Se jes, mi varme bonvenigas vin fariĝi membro de UEA!

Osmo Buller

Ĝenerala Direktoro de UEA

FEINDANCO DE AVINJO

„Mi proponas recepton de favorata drinkaĵo de mia infanaĝo, kion mi lernis de mia avino” – skribis en sia letero sinjorino Kurián, Béláné al receptokonkurso anoncita de iu miskolca gazeto. – „Ankaŭ nuntempe mi pensas volonte pri tiuj vintraj vesperoj, kiam ni, miaj gepatroj, geavoj, kelkaj parencoj aŭ najbaroj kolektiĝis en bona, varma ĉambro.

Tiam, kiel delikataĵon ni surtabligis: rostitajn semojn de melopepo, sunflora grajno, al blanka rostita krakmaizo, kompreneble „natura” (ne saligita). La plenkreskuloj ricevis boligitan vinon por trinki, ni infanoj ricevis drinkaĵon laŭ la nomo „Feindanco”, kiu ricevis la nomon de mia avino. La trinkaĵo ne estis alio, ol mielita bovinlakto. Kiel plenkreskulo mi demandis mian avinjon (kiu se vivus, estus 106 jara), de kie devenas la nomo? – Ne ĉiuj infanoj ŝatas la mielan lakton – klarigis ŝi, – sed, se ĝi havas ĉi tian interesan nomon, kia Feindanco, ili ne pensis pri ties rifuzo. Se tamen okazis tiel, mi kutimis diri, se vi trinkos ĝin, en via sonĝo la feinoj invitos vin al danco. Kaj poste ĉiuj trinkis ĝin....Ŝi ofte diris, ke ĉi tiu drinkaĵo bonefikas, ekzemple: ĝi profundigas la dormon...”

Esperantigis: László Pásztor/Rev: Sándor Horváth

ŜARKIDNASKIĜO PERE DE PARTENOGENEZO

Per partenogenezo, nome sen patro eknaskiĝis ne delonge ŝarkido en la Usono, en la zooparko Henry Doorly. La esploristoj konsideris ĉiujn cirkonstancojn, por pruvi la partenogenezon. Tiel por ekzemplo ili pensis pri „antaŭa vivo” de la genera besto, nome ankaŭ pri tio, ke eble ĝi kopulis ankoraŭ antaŭ ĝia kaptado. Sed, ĉar ĝi estis jam de tri jaroj en la akvario de la zooparko, pro tio la pariĝo ne estis ebla. Eĉ tio ne eblus, ke la nupto okazis en la akvario de la zooparko, ĉar tie vivas nur martelŝarkinoj.

Finfine la DNA-esploro donis la decidan pruvon, laŭ kio evidentiĝis, ke la ido enhavis genetikan materion nur de la patrino. Ĉi tio estas evidenta malavantaĝo en la naturo, ja, la ido ĉi tiel ne ricevis tiun tutan genetikan enhavon, kiun certigas nuptoj de la patro kaj patrino.

Eblas, ke pro tio iĝis la eta martelŝarkido malfeliĉa: ĉar apenaŭ post ĝia naskiĝo, mortigis ĝin iu dorna rajo, tiel same loĝanto de akvario.

Kvankam la partenogenezo estas ne ĉiutaga, sed tamen ne sola fenomeno. Ankaŭ ĉe grandnombraj pli malaltrangaj bestospecioj, ekzemple vermoj, abeloj, afidoj, akaroj, cikadoj, akridoj oni priatentis, ke ĉi tiuj specioj, eĉ ankaŭ kelkaj fiŝ-, rampul- kaj birdospecioj havas ĉi tiun reproduktiĝkapablecon. Ĉe la martelŝarkoj ĝis ĉi tiam oni ankoraŭ ne spertis ĝin.

La partenogenezon plej plurfoje kaŭzas iu eksterordinara cirkonstanco, - asertas la esploristoj. Tio okazas ekzemple tiam, kiam la reproduktiĝon malhelpas diversaj cirkonstancoj, aŭ se ĝi ne estas sufiĉe efika el la vidpunkto de la reprodukto kaj plimultiĝo de raso. Ĉi tiu lasta efikas ĉe la afidoj, kiuj aŭtune reproduktiĝas sekse, kaj helpe de kiraso de tuta genetika enhavo pli sukcese transvivas la pezan elprovon de la vintro. Sed la transvivintaj inoj printempe jam naskas per partenogenezo la novajn idojn, kiuj invade povas okupi la freŝajn ŝosojn kreskantajn en majo-junio.

(El revuo „Szabad Föld” /O8. O6. 2007/ esperantigis László Pásztor/Rev: Sándor Horváth)

NI RIDU Trompiĝo

La edzo iras seneme hejmen, ŝajne mishumore. Li vespermanĝas, drinkas unu glason da vino, poste enlitiĝas apud lian edzinon kaj komencas karesi ŝin.

- Karega mia, – flustras la edzino – hodiaŭ ne eblas...!
- Tion ĉi, mi ne komprenas – grumblas la edzo –, ĉu hodiaŭ ĉiu virino interkonsentis?

La kvakanta „Casanova”

Du ranoj babiladas sur la lagobordo.

- Imagu, mi posedis ĉiun inon en la vilaĝo – fanfaronas la unua.
- Sed, vi povintus preterlasi la filinon de la sorĉisto!

Esperantigis László Pásztor/Rev. Sándor Horváth

LA FESTO DE PUNTO en BÁBOLNA, la 25-26-an de Aŭgusto en 2007

I-a parto

Komence de Aŭgusto 2007, la geedzoj Pásztor ricevis inviton de s-ino Magdalena Mátray, aŭtoro de la eldonaĵo „Lernejo de la Puntofarado”, al la aranĝo „Festo de Punto en Bábolna”, 25-26.08.2007.

La ĉefprotektanto de la aranĝo estis d-rino Klára Horváth, urbestro de Bábolna, parlamenta deputito; ĝin organizis „Mátray-Ház KFT” (KFT = Kompanio kun Limigita Respondeco)-www.matrayhaz.hu).

Programoj:

- 1, „Splitoj”, fotoekspozicio de László Mandur
 - 2, Solenaĵo por transdoni la „Orpunto-premion”, kaj ekspozicio de la ĝisnunaj kreaĵoj premiitaj.
 - 3, Laborprezentado de puntofarantoj el kvar departamentoj kaj de studentoj
- La programoj okazis en la Sporthalo de la urbo Bábolna.

La evento kaj la fotoekspozicio estis inaŭgurita de d-rino Klára Horváth. Ŝi emfaze kaj laŭde klarigis pri la punto-eventaro, jam tradicia en Bábolna, kiun aranĝas la geedzoj Mátray dum la lasta semajnfino de aŭgusto ĉiujare.

Ŝi emfazis ke en nia nuna vivo ankaŭ nun gravaj spertoj fundamentaj estas beleco, amo kaj harmonio, kiujn la duobla evento (punta kaj fota) povas fortigi kaj profundigi en nia animo.

La transdona solenaĵo de la „Orpunto Premio” estis malfermita de s-ro László Mandur, kiu en sia inaŭgura parolado koncize klarigis pri la specoj, teknikoj kaj historio de punto. Sian fotoekspozicion li prezentis per ĉi vortoj: „Vidi kaj vidigi la mondon, propraokule; jen mia celo...Mi havas fotoserion ankaŭ pri fotoraportistoj, troveblan i.a. en la arkivo de MTI (Hungara Informagentejo).”

Liaj fotobildoj estis indaj je atento, ĉiam metantaj la homon en la centron. La specifa vidangulo de la unuopaj fotografiaĵoj bone taŭgis por sentigi ilian samtempan seriozecon kaj fajnan humuron. La fotoekspozicio montrigis tute vidinda.

La partoprenantoj de la puntoekspozicio kaj laborprezentoj estis

- 1, La plenkreskintaj lernantoj de la Puntoprepara Profesia-edukado de la Domo de Tradicioj populara Metodika-metiejo,
- 2, Puntofarantoj de la Békés-departamenta Popolarta Asocio,
- 3, Puntofarantoj de la Popolarta Asocio de departemento Zala,
- 4, plenkreskaj lernantoj de la Puntolernejo de la Domo Mátray.
- 5, Judit Csicsatka (Judit Ĉiĉatka) estis la dekoraciisto kaj la instalistino de la puntoekspozicio aranĝita en la Sporthalo. En la granda spaco per gazo tukoj pentritaj helverdaj kaj karmezinkoloraj, kaj la kolorharmonion donantaj instalaĵoj ŝi certigis la belecon, de emfazante fonon de la delikataj puntokreaĵoj kaj fotoj.

La subtenantoj, protektantoj de la aranĝaĵo estis

- La urba konsilio de urbo Bábolna,
- Nacia Ĉevalposedaĵo de Bábolna,
- Hotelo Bábolna,
- Misztótfalusi KFT (KLR Mistotfaluŝi) – Bábolna,
- Bábolna Sped KFT (KLR Babolna Ŝped),
- Judit Csicsatka dekoraciisto – Bábolna,
- Sukerejo Bálint – Bábolna,
- Gazeto Ácsi Hírek (Famoj de Aĉ),
- Vilaĝa Konsilio de Tárkány (Tarkanj),
- Békés-departamenta Popolarta Asocio – Békéscsaba, (Bekeŝcaba),
- Zala-departamenta Popolarta Asocio – Zalaegerszeg (Zalaegerszeg).

Dum la ekspozicio kaj laborprezentoj, oni regalas la partoprenantojn per refreŝigtrinkaĵoj, kafo, salaj kukoj.

Nia tranoktejo estis en la Hotelo Bábolna, kie por tempo de la aranĝaĵoj ni povis mendi ankaŭ tagmanĝon.

Nia apartamento konsistis ĉambron per multkanala kolora televidilo, telefonaparato, propra banĉambro, toaleto, ŝrankoaro kaj saŭnebleco. Iliaj pliajservoj estis : ĉambroservado, biletmendo al la diversaj kulturaj, amuzigaj amuzeblecoj de la ĉirkaŭaĵo: ĉaso, ĉevalĉarado, rajdeblecoj.

Ekstere: per kamero atentita ferma parkejo, ĝardena-rostkrado, ludejo...staras je dispono de la gastoj. El ĉevalkap-modelaj kaŭstikizitaj vitroj estis preparitaj la lustroj kaj muroj de la klimatizadita restoracio. Ne hazarde estas internacifama la kuiristo de la kuirejo; kuiranta por 120 gastoj. Ili altabligis la matenmanĝon laŭ „svedtabla-maniero”.

Nia tranoktigejo estis agrabla, oportuna, ĉe la ĝentila, afabla priservado: en la kvin jara hotelo. Antaŭ kaj post la aranĝaĵoj ni konatiĝis kun setlejo Bábolna. Ni miris ĝian trankvilon, bele parkitajn stratojn, elegantajn konstruaĵojn, skulptaĵojn, la maneĝejon, la trotkonkursejon, la malnovan kastelon kaj la tuton, ĉio meritis rigardi tie.

-daŭrigo sekvos –

Verkis kaj tradukis Adrienne, s-rino Pásztor / reviziis István Ertl



La foton ni faris dum la inaŭguro de la Festo de la Punto. La malhelruĝvestaĵa damo zoigita per orpunto, estas sinjorino Magdalena Mátray, nia invitinto.

REAPEROS LA ZAMENHOF-MUZEO KAJ ESPERANTO CENTRO

Alvoko al la posedantoj de memoraĵoj ligitaj kun d-ro L.L. Zamenhof kaj aliaj Esperanto-memoraĵoj kun la muzea karaktero

La urbo Bjalistoko alprenis decidon proprakoste renovigi la historian konstruaĵon ĉe la strato Warszawska 15 kaj destini ĝin por la sidejo de Esperanto-Centro je la nomo de Ludoviko Zamenhof. Laŭ la plano la objekto devas esti preta kaj ekipita ĝis la 25-a de julio 2009.

La E-Centro konsistos el tri fakoj:

1. Zamenhof-Muzeo
2. Eduka kaj Kultura Centro
3. Centro pri Esploroj de Kultura kaj Lingva Komunikado

Por Zamenhof-Muzeo ni serĉas memoraĵojn rekte aŭ nerekte ligitajn kun d-ro Ludoviko Zamenhof kaj Esperanto.

La memoraĵojn-eksponaĵojn eblas transdoni senpage aŭ pruntedoni por difinita periodo.

Ĉiujn ricevitajn eksponaĵojn eblos rigardi antaŭ la malfermo de la unua muzea ekspozicio en la retpaĝo de la E-Centro kune kun informo pri ilia deveno. Sekve ili fariĝos elementoj de la virtuala Zamenhof-Muzeo – galerio „Memoraĵoj proksimaj al la koro”.

Ni konscias, ke pro teknikaj kialoj ne ĉiuj eksponaĵoj povos troviĝi en la konstruaĵo ĉe la strato Warszawska 15.

Kiel la unuaj, sian kontribuadon por la kreata Zamenhof-Muzeo anoncis Barbara Pietrzak, la Ĝenerala Sekretario de UEA kaj Osmo Buller, la Ĝenerala Direktoro de UEA.

Ni alvokas posedantojn de ĉi-specaj memoraĵoj, pretajn disponigi ilin al la Centro kontaktiĝi kun la Bialistoka Esperanto-Societo, por ke la grupo laboranta pri la unua ekspozicio povu prilabori ilin kaj la gastoj de la 94-a Universala Kongreso de Esperanto en Bialistoko ilin admiru.

Kontaktu nin uzante la adreson: esperanto.bialystok@interia.pl

Antaŭdankante

Ela Karczewska
Prezidantino de Bialistoka E-Societo



Karnavalaj maskoj de Venezio el sukero – el Kopcsik Marcipanio en urbo Eger

VINTRAJ FAREDAĴOJ – MANĜAĴOJ

En nia departemento (Borŝod), la ÉSZAKERDŐ RT („Norda Arbaro” Akcia Kompanio) prizorgas la flegadon kaj nutradon de la sovaĝbestaro vivanta en la arbaroj.

La arbaristaj fakuloj kaj ĉasistoj fias la nutradon kaj la reguladon de la bestareto en ĉirkaŭaĵo de Miskolc, sur la Bükk-montaraj terenoj, ĉ. sur 26 000 hektara teritorio.

La unuaranga farendaĵo estas la nutrado de la bestoj, la daŭra plenigo de nutraĵoj al la nutrigejoj. Nome, vintre la sovaĝbestoj apenaŭ trovas manĝaĵon en la naturo. Krom la grajna bestnutraĵo, ĉefe la bonkvalita maizo. oni donas – en intereso de la kompensita nutrado - ankaŭ sukdensan nutraĵon: silaĵon kaj por la grandaj-ĉasbestoj furaĝon: luzernon.

El ĉi tiuj multkvintaloj (pluraj centoj de 100 kilogramoj) elĉerpiĝas dum la vintraj monatoj.

Dankoj al la nutrado, ne estas karakteriza la pliigita plimalmultiĝo de la bestaro vintre.


La averaĝa 3-5%-a morto-proporcio malofte estas, ĉefe okazas nur je kazo de alta neĝnivelo, kaj ĉefe en rondoj de pli malgrandaj bestoj cervidoj kaj apretoj, aŭ inter pli malfortaj ekzempleroj.

Grava tasko de la fakuloj - krom la etatnutrado – estas ties regulado.

Nuntempe oni estas en mezo de la ĉas-sezono. La menciita ekonomia kompanio organizas ĉasadojn sur siaj ĉasterenoj por pagantaj ĉasistoj. Dum ĉi monatoj ili mortpafas la gravan parton el la po jara 2000 da sovaĝbestoj, kiujn la ĉasistoj prezenti kutimas sur teronmetite, kiel la tutan dumĉasadan ĉaskaptaĵon.

Mi legis pri la taskoj de la vintra sezono, el la artikolo aperinta en la Miskolc urba semajna gazeto MINAP, 12.. 01. 2008-a numero.

(Kompilis kaj esperantigis ĝin: Adrienne, s-rino Pásztor, reviziis: István Ertl)



Nils Holgerson - fabelo- sukerbildo el Kopcsik Marcipanio en urbo Eger

KOREKTO

Kelkmonatojn pli frue mi faris misskribon en bela poemtraduko de Gergely, Mihály esperantigita de Márton Fejes.

Mi petas pardonon pro la eraro.
Bonvolu legi nun, la poemon ĝuste.

Mihály Gergely:

Timian', belega

Timian', timian',
floreto tre bela;
memoro somera:
odoro kaj gusto,
tiu de julio,
tiu de aŭgusto.
Estiel infano
mi sur fojn' kuŝanta
pensis: timiano
kun odor' de flamo
vivas porĉiamo.
Bela por mia kor',

floro de l' fabelo,
ho, jam delonge for,
pasis al la foro,
kiel voĉ' kukola,
kaj kanteto, mola
tril' de oriolo.
Ŝvebis tra la valo,
al ava kamparo,
al malriĉa tero,
tero de mizero,
al arbara rando.

Timian', timian'
kun odor' de flamo,
ĝojo por infano,
ĝu' por junularo,
kaj nun jam amaro
por mi: homo vanta,
ĵus maljuniĝanta.
Tuj post januaro
venos februaro,
forestas primaver',
majo kaj junio,
julio, aŭgusto,
entute: la somer':
kun la suno brila,
varmo-radiado,
tintado falĉila,
junula kantado,
rido de knabino,
muziko de citroj
alvenis al fino.

Ekfloru, timian'!
Vi estis la dekor'
de mia infanaĝ',
belega por la kor',
branĉ' de vivo juna,
flor' de vivo nuna.
Floru, timiano,
restu la ornamo
al mi, por ĉiamo!

Tradukis: Márton Fejes

DATREVENOJ

Antaŭ 220 jaroj 05.02.1788. naskiĝis la verkisto, poeto, pentristo, arbitracianto Kisfaludy, Károly

Antaŭ 125 jaroj 05.02.1883 naskiĝis la verkisto, publicisto, scenaristo Nagy, Lajos

Antaŭ 180 jaroj 23.02.1828 mortis la poeto, botanikisto, husarkapitano Fazekas, Mihály.

LA BONA IDEO

Neĝulino

La patrino diris al sia fileto fabelon antaŭ ekdormo. La kvinjara fileto postulis ĉiam novan kaj denove pli novan fabeldetalon, do li ne ekdormis baldaŭ. Krome, la fabelo dum la ripetadoj iomete ŝanĝiĝis, transformiĝis.

„Nu: la arbaraj bestetoj tre amis Neĝulinon, do ili multe helpis ŝian laboron. La kapreolo portis sur kornoj en poto freŝan akvon el la arbara fonto, la sciuroj gaje saltadante amuzigis la malgrandan, belegan, orfan reĝidion. Antaŭ la domo la leporoj formaĉis la herbon tiel egalmezure, ke ĝi aspektis kiel vasta, mola tapiŝo” ktp.

La fileto nun oscedis, poste rimarkis: „Ho, panjo! Tiuj leporoj tre saĝaj estis, ĉar ŝparis monon al Neĝulino. Ankaŭ ni aĉetebus kelkajn leporojn por maĉi la herbon en nia ĝardeno. Tiam ankaŭ ni ŝparus la multekostan herbotondilon!”

Originale en Esperanto verkis Adrienne, s-rino Pásztor

POPOLAJ OBSERVADOJ, ONIKREDOJ

La misopinioj, onikredoj de niaj antaŭuloj baziĝis sur observado de la vetero, dum la pluraj jarmiloj.

Tiuj estas ekzemple:

La 2-an de Februaro, se la urso forlasas sian groton kaj dume sunradias, ĝi rekaŝiĝos en ĝin timigate de sia ombro. Tiam la vintro daŭros ankoraŭ dum 40 tagoj. Sed se tiam ne sunradias, la urso restas ekster la groto. Poste la printempo venos baldaŭ.

La 16-an de Februaro, dum nomtago Julianna: plejofte neĝas, sed la vetero poste mildiĝos baldaŭe.

La 19-an de Februaro, dum nomtago Zsuzsanna (Suzana) se ekvoĉas la alaŭdo, baldaŭ ensalutos la printempo.

La 25-an de Februaro, dum nomtago Mátyás (Matiaso): „Se li ne trovas glacieron, faros ĝin, sed se li trovas, fandos ĝin.

El la libro „Miskolci Kincses Kalendárium” (Trezora Kalendaro de Miskolc) esperantigis
Adrienne, sinjorino Pásztor

MI REMEMORAS PRI ADA CSISZÁR

La karaj legantoj povus demandi: kial rememoras mi pluse pri la mortinto?

Tial mi agas tiel, ĉar ankaŭ mi volas honordoni, mi havas kroman dirindaĵon. Ĉar, ankaŭ mi estas bibliotekistino, kaj kvankam mi ne konis persone Ada Csiszár, sed kelktagojn antaŭ ŝia morto okazis evento, kiu trafis min en profundo.

Al mia nomo, sed titolite al la Landa Fremdlingva Biblioteko (OIK-Budapeŝto) pakaĵon portis la poŝtisto de ŝi. En ĝi 19 libroj estis De d-ro Kolomano Kalocsay kaj Pri K. Kalocsay de Ada Csiszár. Ŝi sendis ilin tial, ĉar per lasta espero ŝi esperis: ankoraŭ nun estas kaj estos tiuj esperantistoj, kiuj ŝatas la literaturon, tiun-ĉiun trezoron, kiun reprezentis d-ro Kolomano Kalocsay kaj ŝi.

Ada Csiszár mortis en sia 77-a jaro en Budapeŝto, la 20-an de Novembro 2007, kaj en urbo Veszprém en la familia kriptoj oni metis ŝiajn cindrojn al eterna ripozo, apud ŝian edzon Gyula Csiszár (Julio Ĉisar). Sinjorino Ada Csiszár, antaŭ sia morto prizorgis transdoni ekzemplerojn de la de ŝi mem eldonitaj libroj al la publiko: por eterna gardo kaj uzo, je la plisaĝiĝo de ni ĉiuj.

Ŝin persone mi ne konis, neniam ni parolis, renkontiĝis. Sed, mi tre estimis ŝin kiel: bibliotekiston, entuziasman esperantiston, ĵurnaliston, verkiston.

La priskribo de vivo kaj la grandsignifa verkaro de sinjorino Ada Csiszár troveblas en

- eo.wikipedia.org/wiki - Kategorioj: Hungaraj Esperantistoj, naskiĝintaj en 1930 -
- kaj en la ĉimonata hungarlingva tekstoparto.

Celo de Ada Csiszár estis laŭ siaj propraj vortoj

„Mia ĉefa celo estas, ke ĉio estu publika pri kaj de Kalocsay eĉ tiuj trezoroj estu gardataj en bibliotekoj. Tiel la memoro de K. Kalocsay estas konservata pli sekure, ol ekzemple rete, ja de tie la tekstoj kaj fotoj malapereblas...”

Ada Csiszár atingis sian celon. Ŝi eldonis preskaŭ ĉion kaj eĉ ŝia lasta penso estis: la gardigo de la valoroj en la Landa Fremdlingva Biblioteko.

Ŝi sentis mankon nur de la junaj esperantistoj, kiel skribis en iu letero pri tio:

„Nuntempe faras E-ekzamenon, ĉ. 6-7 mil studentoj jare kaj neniu el tiu granda nombro fariĝas esperantisto...”

Ho, se ĉiujare tiuj 6-7000 hungaraj gejunuloj iĝus esperantistoj! – deziras ankaŭ mi.

Ho, se ankaŭ ili povus senti ties grandiozecon, kaj pluportus transdonante ankaŭ al aliuloj la „Kalocsay-Csiszár-fajron!”

La de Ada Csiszár ricevitajn librojn ni jam registris en la Biblioteko. Mi faris el ili ekspozicion, kio estas rigardebla en la OIK, eĉ ili estas pruntedoneblaj.

Jen, la registritaj libroj:

1. Versojn oni ne aĉetas: Originala poemaro / Kolomano Kalocsay; kun studoj de Ada Csiszár kaj Giorgio Silfer,- Vieno, 1992. Pro Esperanto 115083 lsz.

2. Naŭ poetoj: Poem-libro / de Juliette Baudin-Vatré [et al.] ; red. Kálmán Kalocsay; kun postparolo de Ada Csiszár; bio-bibliografiaj indikoj de Reinhard Haupenthal.-Saarbrücken, 1989, Iltis.115082 lsz
3. In memoriam dr. Kalocsay Kálmán: Abaújszántótól az Eszperantó Parnasszusig, 1891-1976 / Csiszár Ada.-Bp., 1994, Kalocsay Kálmán Baráti Társaság 115081 lsz.
4. Dek prelegoj / K. Kalocsay; [antaŭparolo kaj Ada Csiszár].-Bp.1985, HEA. 115080 lsz.
5. Diino Hertha / Kálmán Kalocsay; ed. Ada Csiszár.-hapeco, 1992, Fonto 115079 lsz.
6. En superlativo: Triobla datreveno de Kálmán Kalocsay / [Hendrik Adamson et. al.]; [resp. eld, antaŭparolo Ada Csiszár].-Bp, 2001, Kal-Ĉi Dokumentaro 115078 lsz.
7. En nacia vesto: Poemoj de Kálmán Kalocsay tradukitaj al naciaj lingvoj / [res. eld.] Ada Csiszár.-Bp.2004, Kal-Ĉi Dokumentaro 115077 lsz.
8. Postrikolto: Poemoj kaj kantoj tradukitaj / [trad.] Kálmán Kalocsay; [resp. eld. Ada Csiszár].-Bp.2004, Kal-Ĉi Dokumentaro 115076 lsz.
9. El la poŝtkesto, 1930-1975 / de Kálmán Kalocsay [resp. eld. Ada Csiszár].-Bp.2007, Kal-Ĉi Dokumentaro 115075 lsz.
10. Selektitaj leteroj, 1927-1975 / de Kálmán Kalocsay.: (resp.eld: Ada Csiszár).-Bp.,2006, Kal-Ĉi Dokumentaro 115074 lsz.
11. Dissemitaj floroj de Kálmán Kalocsay: Originalaj poemoj kaj tradukoj ekstervolumaj / enbukedigita de Ada Csiszár.- Bp.2005, Kal-Ĉi Dokumentaro 115073 lsz.
12. Fabelarbo: Al niaj infanoj malgrandaj kaj grandaj / Kálmán Kalocsay.-Bp.2003, Kal-Ĉi Dokumentaro 115072 lsz.
13. Johano la Brava : Bildrakonto : Adaptaĵo de poemfabelo de Sándor Petőfi / proza teksto de Ada Csiszár; el la hungara trad. Kálmán Kalocsay; bildoj laŭ la freskoj de Béla Sándor.-Bp.1997, Kal-Ĉi Dokumentaro...115071 lsz.
14. 8000 frazologiaj esprimoj esperantaj: Tralaborita kaj kompletigita eldono de la "Domfabriko" / Ada Csiszár, Kálmán Kalocsay.-Bp.,2003, Kal-Ĉi Dokumentaro ...115070 lsz.
15. Senvuale: Pri la pseŭdonimoj de Kálmán Kalocsay / Ada Csiszár.(Bp) 1999, UEA 115069 lsz.
16. Johano la Brava / Sándor Petőfi; Esperantigis Kálmán Kalocsay; Cinigis Li Naixi.-Wuhan, 1997, Hubei-a E. A. 115068 lsz.
17. Das Tagebuch / Johann Wolfgang von Goethe; Esperanto-Übersetzung von Kálmán Kalocsay.-Saarbrücken, 1986, Iltis 115067 lsz.

18. Domfabriko: 6000 szólás és kifejezés magyar és esperanto nyelven / Csiszár Ada, Kalocsay Kálmán.- Bp. 1975, MESZ 115066 lsz.

19. Bibliografio de la verkaro de Ada Csiszár / [kompostis András [Árpád] Máthé].- Bp.,1998, Kal-Ĉi Dokumentaro 115065 lsz.

Ilona Böde - OIK, Budapest - Adrienne, sinjorino Pásztor



Fotoj pri la ekspoziciitaj libroj – Sendinto: Ilona, Böde OIK-Bp.

NI FUNEBRAS DENOVE

„Laŭ informo de Flo Martorell, hieraŭ en sia hejmo forpasis unu el la plej eminentaj esperantistoj de nia tempo

CLAUDE PIRON (1931-2008)

tradukisto ĉe UN kaj ĉe la Monda San-Organizo, poste psikologo, aŭtoro de populara lernolibro "Gerda malaperis", de vaste legata "La bona lingvo", kaj de muzika kasedo "Frandu Piron". Sub la pseŭdonimo Johan Valano li verkis serion da originalaj Ĉu-romanoj.

Fonto: Ret-info

<http://www.eventoj.hu>

De V.Melnikov:

Karaj kolegoj,
eble tiu mesaĝo estos utila por omaĝi la elstaran homon..

Kruela novaĵo : Claude Piron ne plu estas inter ni / Une nouvelle cruelle : Claude Piron n'est plus parmi nous

De: Henri Masson (espero.hm@wanadoo.fr)

Tra Josée kaj Michel Lafosse, kaj Floreal Martorell, mi ĵus eksciis ke forpasis, hieraŭ, en sia hejmo, nia amiko Claude Piron.

Vortoj estas malfacile troveblaj post tiel kruela kaj abrupta novaĵo. Nenio supozigis tiel subitan malaperon.

Lia lasta mesaĝo al mi, de la 19/01/08 8:21, koncernis mian rebaton al Bernard Cassen en "Le Monde Diplomatique" :

Bonega rebato !

Amike,

CP

Jam de jaroj ni kunlaboris, kaj la rilatoj estis agrablaj. Mi invitis lin, kadre de la Kulturaj Kunvenoj de la Pariza Grupo de SAT, en la Centro Pompidou la 3an de februaro 1980, kie li prelegis pri la temo "Pripensoj pri la kontraŭstaro al Esperanto". Li faris konsiderindan laboron por defendi Esperanton kontraŭ misprezentoj. Ni ŝuldas al li tre valoran franclingvan studon "Le défi des langues" (La defio de la lingvoj) aperinta en 1994 che L'Harmattan, Parizo, kaj kiu kontribuis al antaŭenigo de la Internacia Lingvo. Ĝi aperis ankaŭ en la portugala en Brazilo. Aperis de li ankaŭ pluraj romanoj sub la pseŭdonomo Johan Valano. "Gerda malaperis" estas sukcesa lernometodo sub formo de rakonto; Ĝi aperis antaŭ ne longa tempo en Brazilo sub formo de filmo. Multaj paĝoj, eĉ tuta libro, estus necesaj por prezenti tion kion li faris, kiel li venis al Esperanto, ktp.

Pri li :

<http://claudepiron.free.fr/>

http://fr.wikipedia.org/wiki/Gerda_malaperis!

Claude Piron estas aŭskultebla pri Esperanto che Youtube en la angla (unu video) ĉe :

http://www.youtube.com/watch?v=_YHALnLV9XU

en la franca (5 videoj) :

<http://www.youtube.com/watch?v=taLXSe4c498&mode=related&search=>

<http://www.youtube.com/watch?v=amP-Vt-u0Q4>

<http://www.youtube.com/watch?v=tchzxH6hKRA&mode=related&search=>

<http://www.youtube.com/watch?v=Tece443lSkY&mode=related&search=>

<http://www.youtube.com/watch?v=71K-eriifj0&mode=related&search=>

Per tio li restas tamen, iel, kun ni.

Ni estas tutkore kun lia edzino Nicole, ankaŭ esperantistino, kaj lia filino kiu vivas en Usono.

Ni funebras kaj kondolencas.

La Ondo de Esperanto”

Esperanto-Amika Rondo „Király-Lajos” Miskolc, Hungario

Ni funebras kaj kondolencas ankaŭ pro forpaso de samideano

Don Harlow.

Vi povos ekkoni lin - - se vi finlegos lian retpaĝon:

<http://donh.best.vwh.net/Esperanto/Literaturo/literaturo.html>



Niaj elstaruloj ripozu pace. Ni gardos ilian memoron.

La JARO 2008-a

La 2008-a jaro estas same bela, kiel la pli fruaj. La 2008-a, estas jaro de la TERO, de la LINGVOJ, de la BIBLIO kaj de la RATO.

Pri tiuj de la 2008-a jaro, mi skribis eseon. Pli poste mi informos vin, kiam ĝi legeblos.

Adrienne, sinjorino Pásztor



NORDHUNGARIA INFORMO

Pásztor László, Pásztor Lászlóné H-3530. Miskolc, Király u.25. 2/2.

Tel.: + 36 70 206 1739

Tel.: + 36 70 570 8895

Retpošto: pasztor.laszlo4@chello.hu

Retpaço: <http://kiralylajos.extra.hu>

MSN: pasztor.laszlo4@chello.hu